

# Pola

Nro 1

Majo 1946 Maj

Jaro XXXIV Rok

# Esperantisto

# Esperantysta Polski

monata organo de Asocio de Esperantistoj en Pollando

---

## KARAJ LEGANTOJ!

Pro manko de supersignitaj literoj en la presejo ni devas ilin anstataŭigi per litero „h”. Ĉar en Pollando ne estas riceveblaj matricoj linotipaj, ni petas eksterlandajn samideanojn helpi nin en ilia akiro!

## PRZEŁOM

Zniszczona Polska i jej męczeństwo daje prawa i szacunek wśród dobrej części ludzkości. Ale człowiek zły staje się dobrym tylko wtedy, gdy musi. W nowym rozwoju ludzkości, w demokratycznej formie musimy złego człowieka zmuszać, aby był dobrym. Musimy też uważać, aby nie robił tego co już powszechnie jest uznane za błędne.

Któż nie zna trudności, jakie stwarza wieża Babel we współżyciu narodów? Kto nie ocenia wielkiej energii marnowanej na przemawianie w językach niezrozumiałych do elity ludzkości, wysyłanej na kongresy światowe, dla omawiania spraw pilnych, problemów największej wagi? Kto nie zna trudności przy omawianiu zagadnień o życiu i śmierci milionów istnień ludzkich, przy szukaniu dróg, po których ma z pożytkiem kroczyć pan świata — człowiek.

Zagadnienie języka światowego usiłuje dobra część ludzkości rozwiązać już od kilkuset lat. Przed utworzeniem języka światowego esperanto powstało 20 projektów języków światowych. Po jego utworzeniu zaistniało jeszcze 5 projektów. I żaden prócz esperanta nie wytrzymał prób życiowych. W żadnym z tych języków nie odbył się ani jeden poważny kongres. Natomiast espe-

ranto ma za sobą 36 światowych kongresów, przy udziale 500 do 3000 delegatów z 48 krajów, obradujących nad sprawami narodowymi, robotniczymi, fachowymi, nauczycielskimi itp.

Zaden z projektów języka nie ujawnił się praktycznie w prasie, zaś prasa esperancka do roku 1939 liczyła: 24 gazety i czasopisma światowe, 44 gazety krajowe i 23 gazety robotnicze.

Prócz esperanta, żaden z tych sztucznych tworów nie dożył pięknych i wiernych przekładów Moliera, Szekspira, Andersena, Gogola, Mickiewicza, Orzeszkowej, Prusa, Tolstoja, ani oryginalnej literatury Baghy'ego, Belmonta, Grabowskiego czy poezji Kolocsay'a i innych. Do tego według opinii lingwistów nadał się tylko esperanto.

W szybkim życiu dzisiejszym, w malejącym nam świecie, przy oszczędności energii ludzkiej, jednojęzyczna maszyna drukarska, kino, radio, wycieczki, kongresy, prasa fachowa, mają bardzo doniosłe znaczenie. Ludzie praktyczni zaprzestają jałowej dyskusji: czy esperanto jest żywy, czy dostatecznie rozwinięty, czy uznany przez rządy, czy zrozumiały i jednolity dla wszystkich?

Zyjemy w wieku cyfry. A cyfry i praktyka przemawiają za esperantem. Nie widzi tego tylko ten, kto nie zajmuje się zagadnieniami ludzkości.

Kongres robotniczy w Paryżu 1945 r. jak i inne kongresy światowe, postawił sobie ramy językowe. Oficjalnymi językami były ogłoszone: angielski, francuski, niemiecki, włoski i jako nowość język rosyjski.

Wszak pięć języków do wyboru! Pięć maszyn drukarskich przygotowywało teksty przemówień dla kilkudziesięciu maszyn w językach innych narodów, aby teksty te znów służyć mogły dla nowych tłumaczeń przy odpowiedziach i „dyskusji” nad sprawami przy których nawet w naszym ojczystym języku dobieramy słów i odcieni, dla ścisłego wyrażenia myśli. Ten bezcelowy młyn dziś już staje się profanacją każdej mowy ojczystej i zataratą energii, godnej lepszej produkcji.

Delegacja polska na kongres nie była w stanie przewyciężyć trudności językowych i nie chciała się poddać przemocy językowej innego narodu. Delegaci naszych związków zawodowych, wbrew zasadzie kagańcовой przemawiali w języku polskim. Przełom ten wyzwolił wszystkie inne delegacje. Każdy naród w dalszych obradach przemawiał już w swoim języku. Maszyna drukarska kongresu musiała się uwielojęzić. Zamieszanie i nieoczekiwane poszukiwanie tłumaczy utrudniło pracę kongresu. Spowodowało to zdenerwowanie w biegu prac delegatów.

Ale czyż wieża Babel zawsze może utrudniać bieg naszych prac? Czyż robotnik nie mający czasu ani pieniędzy na 2 do 6-letnią naukę języków obcych, może dać się spychać do roli ofiary podziału językowego? Prężne są ramiona ludzi pracy i zahartowane w walce, ale po co ta praca językowa, gdy na całkowite władanie esperantem wystarczy dla robotnika dosłownie 100 godzin nauki.

Delegacja powróciła do kraju. Prawda, dokonała wiele. Cyfry są bardziej zrozumiałe niż słowa. Ale mogliśmy być lepiej i z mniejszym wysiłkiem rozumiani przez świat. Refleksje — A cóż ten esperanto? Wszak żyje! Miliony ludzi nim operują! Więc jakto? Co tu stoi nam, robotnikom na przeszkodzie? Dlaczego dotąd Międzynarodówka nie stosuje esperanta choćby tylko jako szóstego języka oficjalnego? Przecie Międzynarodowe Biuro Pracy w Genewie już wydawało swój biuletyn po esperancku i zalecało organizacjom robotniczym stosowanie języka esperanto.

Musi przyjść czas, gdy każdy obywatel kraju, szanując swoją mowę ojczystą, stawać się musi obywatelem świata, mówiącym wspólnym językiem światowym. Czas już zaprzestać przemocy językowej. Zdemokratyzować mowę ludzką w języku łatwym i dla wszystkich zrozumiałym.

**Bol. Czechowski**

## ANSTATAU PROGRAMO.

Baldau pasos 7 jaroj, kiam aperis la lasta numero de „Pola Esperantisto“ Ghi estis la numero de julio 1939 j., de antaŭlasta monato de la paco, kiun sekvis preskaŭ sesjara milito, alportinta teruran hombuchadon, kruelan ruinigon, de miloj da urboj kaj landoj, kauxinta chiun mizeron korpan kaj animan, stariginta novan epokon de koncentrigaj tendaroj, de amasa mortigado de milionoj da homoj de diversaj nacioj kaj rasoj. Ne estis do mirinde, ke tiu chi periodo de sangovershado ne permesis al pacamantoj ilian pluan agadon kaj postulis el iliaj vicoj multon da viktimoj.

La Hitlera reghimo en Europo persekutis esperantan agadon tie, kien venis reprezentantoj de gestapo kaj ghiaj helpantoj. Kiel unuaj viktimoj falis polaj esperantistoj; oni arestis ilin, serdis en koncentrigejojn, kie ili rapide au malrapide agonis, detruis au forbrulis esperantajn bibliotekojn, opiniante tiamaniere forvishi ech postesignon de Esperanto en Pollando. Malrapide fluis la tagoj de germana teroro, sed venis fine la tago de liberigho. Kaj tuj ankoraŭ en ruinoj de daŭranta milito la travivintaj esperantistoj en Pollando komencis la agadon. La unua

tasko estis kalkuli nin, konscii kiom da samideanoj savis sin el la katastrofo, kiajn perdojn kauzis la milito, post kio povis sekvi la organiza laboro per restarigo de la esperanta movado kaj ghia apogo sur firmaj fundamentoj.

La perdoj inter la pola esperantistaro estas grandegaj, ne nur ciferaj sed precipe laŭvaloraj. La plej eminentaj samideanoj estis buchitaj kaj mortis pro malfavoraj dummilitaj cirkonstancoj. Kiam ni faros la statistikon, ni ekscios la ciferojn!

La postmilita laboro devis iri du direktojn: 1) plenigi la vicojn per novaj adeptoj kaj 2) kunigi la restintajn samideanojn en unu organizaĵon por ne dispecigi la fortojn. Tio estis la unua tasko de revivigita movado en Pollando, kiun ni, kvankam malrapide solvas. Per kursoj plenighas la truoj faritaj de la milito. Per fondo de Asocio de Esperantistoj en Pollando ni intencas starigi unu centran fokuson, kie koncentriĝos ĉiuj agemaj samideanoj sur demokrata bazo. Al ni povas alighi kaj apartenas ĉiu esperantisto sen diferenco de raso, religio aŭ politika vidpunkto, ne ekzistas do nun ĉe ni apartaj grupoj de neutraluloj, rughuloj ktp. Sed tio ne signifas, ke agado de diverspensantoj estas nebla. En kadro de la Asocio la sampensantoj povas formi siajn apartajn sekciojn kaj labori inter siaj sferoj por la bono de la komuna ideo.

La disvolvighanta esperanta movado en nia lando renkontas ĉiŭpashe diversajn malhelpojn, kaŭzitajn de la longedaura germana okupado de la lando. Mankas lernolibroj, estas savita de la pereco nur malgranda kvanto da esperantaj libroj, forestas propaganda materialo, ne ekzistis fine la gazeto, tiu ĉi ligilo inter la esperantistaro, tiu ĉi kroniko de esperantaj novajhoj, tiu ĉi plej facile atingebla legomaterialo por ĉiu esperantisto. Ni devis nepre almenaŭ parte trovi solvon de tiu ĉi malfacila stato. Ni instruas sen lernolibroj, la restintaj libroj estas multe legataj. Tial ni, kvankam ankoraŭ malfortaj, tamen entreprenas eldonadon de la gazeto, celante tiamaniere fari la unuan paŝon por doni al la pola samideanaro legomaterialon kaj ligi pli forte la membrojn kun la centra landa organizaĵo. Ni aperigas la gazeton sub la malnova titolo „Pola Esperantisto“, kvankam kelkuj postulis ŝanĝon. La ŝanĝo niaopinie ne estighas per alinomigo, sed per la spirito, kiu regos sur la kolonoj de la gazeto.

Ni ne disponas ankoraŭ per sufiĉaj rimedoj, kiuj certigus la daŭran aperon de la gazeto, sed nin subtenas la espero, ke ĉiu laŭ sia eblo helpos al ni en la entrepreno kaj unue ekabonos la solan gazeton aperantan en Pollando kaj due zorgos, ke baldaŭ estighu speciala fondo garantianta la daŭran aperadon de nia monatulo.

Sed ankau la eksterlanda samideanaro, speciale tiu, kiun ne tushis au nur nemulte la milito, devas helpi nin kaj ni atendas de ghi plenan subtenon en chiu formo. Ni ja laboras por komuna ideo!

La eldonanto de „P. E.“

## X. POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO

Lau decido de la Chefa Estraro de A. E. P. kaj interkonsente kun la loka grupo en Łódź la X. Kongreso de pollandaj esperantistoj okazos dum la Pentekosto t. e. en la tagoj 9. — 10. de junio 1946 en Łódź.

Pluaj sciigoj pri kotizoj, programo, ejo ktp. ni publikigos au en plej proksima numero de „Pola Esperantisto“ au aparte ni presigos flugfoliojn kaj dissendos ilin al samideanoj.

Chiujn korespondajhojn kaj alighilojn bonvolu direkti jam nun al adreso: Bolesław Monkiewicz, Łódź, str. Gdańska 40/4, Asocio de Esperantistoj en Pollando

### KOMUNIKOJ DE A. E. P.

**Generala Kunveno de delegitoj de A.E.P. okazos dum la Pentekosto, la 9. — 10. de junio 1946 j. en Łódź kun jena tagordo:**

1. Raporto pri la agado de la provizora Chefa Estraro
2. Elekto de la Prezidantaro, de la Chefa Estraro kaj de la Revizia Komisiono
3. Budgheto por la jaro 1946
4. Proponoj kaj informoj.

En la Ghen. Kunveno rajtas partopreni nur delegitoj de la grupoj, posedantaj skriban rajtigilon. Aliaj personoj povas ghin partopreni nur kiel gastoj sen vochdonrajto.

Lau § 13 de la regularo la Ghen. Kunveno estas decidopova, se la cheestantaj delegitoj al vochdono rajtigitaj reprezentas minimume 1/4 de chiuj vochoj, per kiuj disponas chiuj membroj de la Asocio.

Se la Ghen. Kunveno ne povas okazi pro manko de la supre menciita plimulto, la Chefa Estraro estas devigata en dauro de plej proksimaj 2 semajnoj kunvoki denove la Ghen. Kunvenon, dum kiu estos la decidoj akceptataj sendepende de la nombro da reprezentitaj vochoj. Dum tiu chi Ghen. Kunveno ne validas § 8, alineo I kaj II kaj § 12 alineo III frazo 1-a. La proponoj por la Ghen. Kunveno devas esti sendataj al la Chefa Estraro plej malfrue ghis la 25. de majo kj., aliokaze ili ne estos pri-traktataj dum la Ghen. Kunveno.

Chefa Estraro de Asocio de Esperantistoj en Pollando:

**L. Kuczer**  
ghen. sekretario

**J. Alfus**  
prezidanto

## PROF. ODO. BUJWID

Inter la perdoj, kiuj tushis la polan kulturon dum la milito, la unuan lokon okupas la personeco de prof. Bujwid. Li estis unu el plej popularaj homoj en Pollando kiel ankaŭ eksterlande pro sia scienca agado sur la kampo de higieno kaj batalo kun infektaj malsanoj kaj ankaŭ kiel unu el plej eminentaj esperantistoj.

Li naskighis la 30. de novembro 1875 jaro en Wilno. Gimnasion kaj universitaton li finis en Varsovia. En 1885 jaro kiel stipendiisto li veturas al Berlino por auskulti prelegojn pri bakteriologio de prof. Koch, poste li lernas en Parizo che prof. Pasteur la metodon de kontraurabia kuracado. Reveninte al Varsovio li fondas tie Instituton de kontraurabia inokulado. Vokita kiel profesoro al krakova universitato, kie li prelegis pri higieno, li malfermas ankaŭ tie kontraurabian instituton kaj okupighas pri produktado de kuracaj serumoj kontraŭ infektaj malsanoj.

Prof. Bujwid esperantighis en 1911 j., kiam iniciantintoj de la VIII. Universala Kongreso de Esperanto invitis lin al partopreno en laboroj de la Kongreso. Lastajn 20 jarojn de sia vivo li tute dedichis al Esperanto kaj disvastigo de la ideo, partoprenante aktive en la laboroj chu kiel prezidanto de krakova Societo „Esperanto“ chu kiel prezidando de P. E. D., la centra organizajho esperanta en Pollando, chu kiel redaktanto kaj eldonanto de „Pola Esperantisto“, kies aperigado estis ebligata nur dank'al lia subteno. Krom tio li kunlaboris en fakaj, sciencaj asocioj kaj gazetoj. Li ne hezitis entrepreni longan-voĵaghon, se tion postulis la bono de la afero kaj partoprenis chiujn universalajn kongresojn, ne menciante pri landaj konferencoj de apudaj ŝtatoj.

La eksplodo de la milito kun siaj kruelajhoj, kiuj lin ankaŭ tushis en formo de vizito tuj post invado de germanoj en Pollandon de gestapanoj, kiuj faris revizion en lia hejmo kaj konfiskis lian abundan bibliotekon esperantan, submetante lin al malagrabra esploro, multe influis lian sanon. Nur dank'al lia maljuneco au pli ghuste al lia instituto, kiu produktis serumojn kontraŭ infektaj malsanoj, kiujn la germanoj tre bezonis, li savis sin el la manoj de gestapo. Malgrau laushajne malespera situacio de Pollando, li neniam chesis kredi pri venko de la justeco kaj revivigho de sia patrujo. Bedaurinde li ne ghisvivis tiun chi momenton, char li mortis la 26-an de decembro 1942 jaro.

Lia memoro chiam vivos en la koroj de polaj esperantistoj!

## DEMOKRATIZO DE POLLANDO

La plej karakteriza eco de la de hitleriana jugo liberigita nuntempa Pollando estas — la grandega procedo de demokratizo de la lando, kiu apenau nun, do kompare kun Okci-

dentaj Landoj kun chirkau 100-jara malfruigho — vere okazas che ni.

Ghojante pro tio, ni polaj demokratoj kaj esperantistoj samtempe — aspirantaj chame al vera internacia fratigho, deziras dividi tiun-chi ghojon kun vi, samideanoj eksterlandaj, kaj klarigi al vi en kelkaj vortoj, en kio konsistas la esenco de tiu demokratizo.

Vere ne en tio, ke ni nomighas Republiko; ankau ne en tio, ke la chefoj de tiu Republiko estas iamaj laboristoj kaj oficistoj; nek en tio, ke en oficiala titoligo ni ne plu uzas la feuda lan vorton „pan“ (sinjoro), sed la vorton „obywatel“ (civitano); chio-chi estas ghustaj, sed nur eksteraj signoj de demokratizo. La vera esenco de tiu demokratizo konsistas en tio, ke la pola popolo farighis ghuste dum la terura okupado plenkonscia nacio, sentanta sin kiel unuo, kiel tutajho, plene respondeca pri la sorto de sia patrujo, deziranta preni sur sin la taskon de ghia gvidado kaj evoluo — same ekonomia kiel kultura. Fine — ke tiu-chi pola popolo — per siaj plej konsciaj reprezentantoj kaj gvidantoj — volas farighi egala al la plej evoluintaj nacioj kun ilia socia kaj kultura progreso.

Tiun procedon travivis la okcidentaj landoj — precipe Ameriko, Anglio kaj Francio jam antau 200—100 jaroj. Similan procedon travivis kaj travivas ghis nun nia plej proksima orienta najbaro — Ruslando kun la kun ghi ligitaj nacioj, kvankam en alia formo politika, sed esence la saman. Tiun-chi staton atingis jam delonge tiaj europaj landoj kiel Svisio, Svedio, Danio, Norvegio ktp., Al tiu stato alproksimighadis la antaumussoliana Italio kaj antauhiteriana Germanio. Nur Pollando, Hispanio, Hungario kaj kelkaj balkanaj landoj post la unua mondmilito staris — chiu en propra formo — sur la bazo de mezepoka ekonomia kaj kultura feudalismo, t. e. stato, en kiu la popolo mem havas nenian rajton por esprimi sian volon, sed en kies nomo tiun volon esprimas sinjoroj, edukitoj, en plej bona okazo intelektuloj, akre distingighantaj de la meza nivelo de la psihha kaj socia nivelo de la laborantaj klasoj. Nenion en tiu stato shanghas la fakto, ke ni nomighis — nur nomighis — jam en la periodo 1918—1939 „Republiko“ kaj havis parlamenton, bazitan sur ghenereal-demokratiaj principoj. Ghi estis nur formo. Esenco restis sinjora, nobelula, aristokrata, burghara, kapitalisma, parte nur et-burghara, dume la vera volo de la popolo — vilaghana kaj laborista — apenau povis susumi, mallautete esprimi sian penson, timante la persekuton flanke de la reganta klaso de feodaluloj kaj kapitalistoj, kiuj shajnis esti la veraj reprezentantoj de la nacio.

Kial ghi estis tiele?

Por respondi al tiu demando, ni devas retrovasti historie al la jaro 1772, kiam Pollando komencis perdi sian politikan sendependecon kaj subiris en la jugon de tri najbaraj ŝtatoj — Prusio, Austrio, kaj la carisma Rusio. En tiu epoko Francio preparighis al sia Granda Revolucio, dum kiu la feudalismo estis forigita. Depost tiu tempo, do pli ol 150 jaroj, preskaŭ ĉiuj landoj de Europo travivadis la epokon de sistema, pash-popasha demokratizo, batalante por akiri: demokratian sistemon de popola reprezentado en la registaro (parlamentarismo), por realizi devigan edukadon de ĉiuj infanoj por ekbatali siajn rajtojn por la laboristoj, por havi veran liberecon de penso, presaro, unuigo, politika kaj religia mondrigardo-ktp. ktp. Fine — por preparo al solvo de la plej malfacila problemo — problemo socia, forigo de ekonomia maljusto kaj de la socia malegaleco de la apartaj klasoj. Dum tiu-ĉi tempo la popoloj de Okcidento konstruis ĉiujn siajn potencajn ekonomiajn organizojn — sindikatoj kaj kooperativoj, kiuj devis servi al ghi je fundamento de la postea fina socia liberigo.

Tiun-ĉi grandegan historian procedon ni, Poloj, ne povis travivi kiel tutajho. Estas vero, ke niaj plej progresemaj elementoj partoprenis tiun-ĉi tuteuropan movadon kiel elmigrintoj el sia propra patrujo, sed tio estis nur parteto de la nacio, la malsupraj klasoj entute ne partoprenis tiun batalon, ja ĉiuj plej ofte ne sciis la nomojn de tiuj en eksterlando batalantaj samlandanoj. Estas ankaŭ vero, ke en la lando mem eta parto de sociaj laborantoj depost cent jaroj jam klopodis kiel ghi povis, por servi al la simpla popolo per sia klerigo, ke estis ĉe ni vilaghanaj kaj laboristaj partioj, sed ili ne atingis ĝisfunde la kernon de la popola maso mem, ili kvazaŭ naghis sur la ekstero de la amaso, ne enirinte en ĝian sangon, en ĝian animon kaj penson.

Niaj plej esencaj pensoj rilatis ne al politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj reformoj, sed nur al liberigo de la nacia jugo, al politika sendependeco. Dum pli ol 150 jaroj la plej konsciaj partoj de la nacio vivis nur per tiu sola penso. Sed tio estis stato — kompare kun aliaj liberaj nacioj — nenatura. Jugo, karcera bastiono, vivo en nacia subpremeco — ne estas ŝtatoj naturaj. Ili kontraŭas la homan naturon, do la homa naturo ribelighas kontraŭ ili, sed — ni devas konfesi, ke tiu ribelo, kvankam tiom natura, ne estas stato normala, se ghi etendighas je kelkaj generacioj, kiel estis ĉe ni. Do ni vivis en nenatura situacio, kaj tiu nenatureco influigis ĉiujn niajn pensojn kaj sentojn tigrade, ke ni farighis surdaj kaj blindaj je ĉio alia, kio okazis en aliaj landoj, do ankaŭ al



la socia progreso. Ja eĉ niaj plej reakciaj partioj deklaris, ke la penso mem pri sociaj ŝanĝoj kaj reformoj estas peko kontraŭ la nacio, ke ni ne devas celi sociajn ŝanĝojn, sed nur nure nacian sendependecon.

En tia atmosfero venis la sopire atendita sendependeco en novembro de la jaro 1918. Sed ni festis ekonomie, kune kun Hungario kaj Rumanio, la sola lando de Europo, kie grandbienuloj, nobeluloj kaj magnatoj havis grandegan parton de la tero en sia posedo. Tiu klaso, kvankam nombre ne tiom multa, psihhe influis la tutan nacion, kiu pensis ĝian penson, feŭdalan penson, kiu eĉ mortigis la unuan Prezidanton de la Pola Respubliko nur pro tio, ke li estis vera demokrato, ke li volis fari Pollandon simila al okcidentaj demokratiaj landoj.

Jure ni havis ĝhis la jaro 1939 malnovan, Napoleonan civil-juron kun ĉiuj ĝhiaj malnovecoj kaj malrajtigoj de la virino, kaj la kriminala juro restis dum 13 jaroj de la sendependeco tiu de pure despotisma cara Ruslando, kiu proklamis religian malegalecon, politikajn persekutojn nur pro la diferenco de mondriĝardo. Niaj popolaj organizajhoj estis persekutataj, la homoj oftege malliberigataj, gazetoj konfiskataj, libroj de ekterlando ne allasataj, nenia nova religia movado permesita krom tiuj, kiujn permesis la caro — unuvorte — regis en la tuta lando feŭdala pensmaniero, feŭdala psihhiko, ne volanta cedi al la naskighanta popola liberigh-movado.

Plej dolore tiu-ĉi stato ekmontrighis sur kampo de popola klerigo kaj kulturo. Ni havis la duan au trian lokon sur la listo de analfabetaj landoj en Europo, niaj lernejoj dividighis programe je „vilaghanaj“ kaj „urbanaj“ kaj staris sur malalta nivelo, ni havis tre malmutajn fakajn lernejojn — kaj ĉiuj voĉoj al plibonigo de tiu stato estis subpremitaj ofte eĉ per karcero — unuvorte — malgrau ke ni nomighis — „respubliko“, ni estis vere mezepoka, feŭdala, kapitalisma ŝtato, regata per la „supraj 10.000“. La preskau 20-miliona amaso de la pola vilagha kaj laborista popolo estis flankenshovita, neglektata en siaj tendencoj, ja persekutata en la personoj de siaj plej oferemaj defendatoj.

(daurigota)

Jan Zawada

### KONCIZE PRI NIA AGADO

Tuj post la forpelo de germanoj el Pollando fondighis la 18.-an de marto 1945-j. krakova grupo. Malnovaj esperantistoj, s-anoj Alfus, Janowicz, Mayer, Piotrowski, Rauczyński, Sygnarski kunlaboris en la fondo de la grupo. La fondintoj reprezentis ĉiujn sferojn de la socio — tamen la ideo de Esperanto kunigis ilin por

la komuna afero. Komencighis la laboro: kursoj, prelegoj, kunvenoj, restarigo de la biblioteko ktp. Post interrilato kun s-anoj el Varsovio kaj Łódź oni decidis fondi centran organizajhon por Pollando. Oni ellaboris regularon, sendis ghin al autoritatoj por legaligo kaj per oficiala decido de 17. XI. 1945 ekestis Asocio de Esperantistoj en Pollando kun sidejo en Kraków. Adreso de la Asocio estas: Kraków, Rynek gł. 34, ofic. III etagho. Sur bazo de la regularo krakovaj membroj elektis provizoran Chefan Estraron, konsistantan el jenaj personoj: prezidanto — J. Alfus, vicprezidantoj — J. Hećko kaj J. Silhan, ghen. sekretario — L. Kuczer, sekretario — A. Piotrowski kaj aliaj. Komencighis organiza laboro per starigo de lokaj grupoj. En nelonga tempo estis fonditaj grupoj en jenaj urboj: Varsovio, Łódź, Kraków, Chropaczów, Szopienice, Pruszcz Grański; aliaj grupoj estas en organizo.

Pro manko de loko ni ne povas doni raporton pri la agado en aliaj urboj, ghi sekvos en plej proksima numero de „P. E.”

## SPOŁECZEŃSTWO AMERYKANSKIE

### A ZAGADNIENIE JĘZYKA MIĘDZYNARODOWEGO

Instytut Gallupa w Nowym Jorku rozpiśał z końcem ubiegłego roku ankietę na temat języka międzynarodowego, zadając trzy następujące pytania:

1. Czy należy wprowadzić do szkół obok języka ojczystego naukę języka międzynarodowego, przy pomocy którego członkowie różnych narodów mogliby się lepiej porozumieć ze sobą? Odpowiedź: 71 proc. tak, 17 proc. nie, 12 proc. nie odpowiedziało.
2. Czy Organizacja Narodów Zjednoczonych powinna przestudiować różne języki i wybrać jeden z nich do użytku? 57 proc. odpowiedzi potwierdziło to pytanie.
3. Jeśli jakiś inny język a nie twój, który język chcesz wybrać? Odpowiedź: 19 proc. francuski, 19 proc. hiszpański, 5 proc. niemiecki (1), 3 proc. rosyjski, 2 proc. esperanto, 2 proc. łacina, 6 proc. odpowiedzi było mieszanych a 19 nie dokonało wyboru.

Rozważając wyniki tej ankiety, dochodzi się do wniosku, że 71 proc. społeczeństwa amerykańskiego uznaje potrzebę przyjęcia języka międzynarodowego do stosunków między narodami i zgadza się na wprowadzenie nauki tego języka do szkół, podkreślając, że wprowadzenie tego języka byłoby jednym z czynników wzmacniających pokój światowy. Od tego stwierdzenia jeden krok tylko do uznania Esperanta za język najlepiej nada-

jący się do stosowania go w stosunkach międzynarodowych, tym więcej, że nie ma widoków, by narody zdołały uzyskać wzajemne porozumienie co do uznania jednego z narodowych języków za wspólny.

## ZE ŚWIATA

**Argentyna.** 3. Kongres esperantystów argentyńskich odbył się w Rosario, drugim co do wielkości mieście republiki. Podczas kongresu urządzono 12 prelekcji w 4 stacjach radiowych i w publicznych zebraniach. Gościem honorowym Kongresu był ks. J. B. Kao, wybitny esperantysta chiński, będący w podróży po Ameryce.

**Bulgaria.** W dniach 2—4. 9. 1945 odbył się w Sofii pierwszy w oswobodzonej Bułgarii a 28 z rzędu Kongres bułgarskich esperantystów, na którym było reprezentowanych 26 grup. Z ważniejszych uchwał należy wymienić: 1) zalecenie, by prace związać z ruchem robotniczym i urządzać kursy oraz tworzyć grupy w organizacjach zawodowych, świetlicach fabrycznych, spółdzielniach itp., 2) rozpoczęcie prac nad wprowadzeniem Esperanta przede wszystkim do szkół zawodowych i gimnazjów. 3) polecenie zorganizowania współpracy z esperantystami państw bałkańskich, zwołanie konferencji zawodowych celem wykazania użyteczności tego języka w życiu praktycznym itd.

**Francja.** W Paryżu, prócz licznych kursów urządzanych przez grupy esperanckie, zostały zorganizowane 4 kursy pod auspicjami wpływowego Association Polytechnique. Dziennik medyczny w Lyonie wyznaczył premię w wysokości 1.000 fr. dla studenta medycyny praktykującego w lyońskim szpitalu, który złożył pomyślnie egzamin z nauki języka Esperanto. W Megeve uczy się Esperanta 180 dzieci na 9 szkolnych kursach, w tym samym mieście odbywają się 2 kursy dla dorosłych.

W dniach 20—22 kwietnia odbędzie się pierwszy Kongres Przyjaciół S. A. T. w mieście Nancy.

**Holandia.** 27 Kongres esperantystów holenderskich urządzają związki esperanckie w dniach 20—22. IV. br. w miejscowości Alkmaar.

**W. Brytania.** Międzynarodowa Esperancka Liga (I. E. L.), której siedziba znajduje się w Londynie, zainicjowała akcję zbierania petycji ze wszystkich krajów świata celem przedłożenia Organizacji Narodów Zjednoczonych wniosku o uznanie języka Esperanto za język międzynarodowy i wprowadzenie go do użytku w stosunkach międzynarodowych.

W ostatnim roku ukazało się 25 nowych czasopism esperanckich, przeważnie na oswobodzonych terytoriach Europy: we Francji, Belgii, Holandii, Danii, Norwegii, Finlandii, Czechosłowacji, Bułgarii, Grecji.

### CIFEROJ, KIUJ INSTRUAS,...

Por ekscii la ciferon de la loghantaro unuflanke kaj konstati la sumon da homaj perdoj dum la milito duaflanke aranghis la registaro en Pollando en februaro kj. sumigon de la loghantoj. La provizoraj ciferoj estas frapantaj.

La cifero de la loghantaro atingis sumon da 23.622.000, dum en la jaro 1931 oficiala cifero estis 31 milionoj kaj en 1939 la neoficiala nombro de la loghantaro estis pli ol 34 milionoj. Komparante la ciferojn de 1939 kaj 1946 j. oni konstatas malpligon de 11 milionoj da homoj. De tiu chi sumo oni devas forkalkuli 3½ milionoj da loghantoj de orientaj teritorioj, kiuj jam ne apartenas al Pollando kaj alkalkuli 2 milionojn da germanoj en okcidentaj terenoj nun apartenantaj al ni. Sume do la loghantaro de Pollando malpliighis je pli ol 9 milionoj, kiuj dum la milito au estis mortigitaj de la germana teroro au mortis en koncentrigejoj au en laboraj tendaroj de Germanujo.

Por pli bone ilustrati la suprediritan ni citas komparajn ciferojn de kelkaj plej grandaj urboj polaj de jaro 1939 kaj 1946:

	1939	1946
Warszawa	1,289.000	476.000
Łódź	672.000	496.000
Kraków	259.000	300.000
Poznań	272.000	268.000
Bydgoszcz	141.000	134.000
Katowice	134.000	128.000
Częstochowa	138.000	101.000
Lublin	122.000	99.000
Gdynia	130.000	79.000
Sosnowiec	130.000	78.000 da loghantoj.
	k. tp.	Alf.

### MEMORE AL TIUJ, KIUJ FORIRIS!

**Bujwid Odo** prof. mortis la 26. XII. 1942 kiel 85-jarulo. Prezidento de la centra organizajho en Pollando P. E. D., prezidanto de Societo „Esperanto“ en Kraków, eldonanto kaj redaktoro de „Pola Esperantisto“, prezidanto kaj membro de diversaj

sciencaj asocioj esperantaj, estis samtempe fame konata kiel scienculo. La esperanta movado multe ŝuldas al li. Ni aperigas pri lia vivo apartan artikolon.

**Zamenhof Lidia kaj Zofia**, filinoj de la Majstro, murditaj de la germana reĝimo en la jaro 1943 en Varsovio.

**Zamenhof Adam**, filo de la Majstro, arestita kaj poste murdita en germana malliberejo en unuaj jaroj de la milito.

**Rosenstock Leon** dro (Napoleono), ghen. sekretario de VIII. Universala Kongreso de Esperanto en 1912 en Kraków, vicprezidanto de P. E. D. mortis dum la milito en Rusujo.

**Pruski Czesław**, prezidanto de lublina Pola Esperanto Societo arestita kaj murdita de germanoj.

**Hartman Aleksandro**, konata varsovia samideano falis kiel oficiro de pola armeo en septembro 1939 j.

**Chmieliński M. ingh.**, reprezentanto de I. E. L. por Pollando, loĝinta antaŭ la milito en Tcruń, mortis en Varsovio en 1944 j.

**Shapiro Jakobo**, (Josho), chefdelegito de U. E. A. en Pollando, prezidanto de Zamenhofa Esperanta Societo en Bialistoko, ĵurnalisti, murdita de germanoj en varsovia „ghetto“ en 1942 j.  
(daurigota)

**De la Redakcio.** Ni petas niajn samideanojn, ke ili bonvolu sendi al ni sciigojn pri la sorto de konataj al ili samidenoj.

## EL KULTURA VIVO DE POLLANDO

**Nekutima jubileo.** En kuranta januaro tuta Pollando kune kun la plej vastaj rondoj de krakovaj teatramantoj solene, festis nekutiman — eble unuan en la historio de teatro — jubileon: unu el la plej konataj polaj aktoroj, Ludoviko Solski, festis jubileon de sia 70 (jes, sepdek!) jara teatra agado.

Tiu naudekjara talenta artisto prezentans la plej admirindan specimenon de vivkapableco, li, kiu reprezentas la historion de pola teatro kaj estis unu el kreantoj de disfloro de tiu teatro en fino de XIX kaj komenco de XX jarcento, kunlaboranto de genia Wyspiański.

Solski mirigas per sia nekutima vasteco de talento — li estas perfekta ne nur en roloj tragikaj kaj patetikaj, sed ankau en groteskaj kaj komikaj. Ne estas tia tragika pasio, por kiu Solski ne povus trovi plenvivan esprimon. Harpagon de Moliere au maljuna soldato en „Varsovianino“ de Wyspiański au revolucia heroo de insurekcio estas same perfekte kreitaj kiel groteska tipo el komedio de Shakespeare.

**Laboristoj skribas...****NUR VOLU.**

Post kvinjara interrompo de laborista esperanta movado en Pollando ghi estas renovigita kaj hodiau ni ne estas jam persekutaj kiel ni estis dum regado de fashismo antau la milito. Antau la milito ni, laboristoj ne havis rajton havi propran esperantan organizon kaj tiel nomataj neutraluloj ne volis akcepti nin kiel laboristan sekcion, char ili timis, ke ni estas komunistoj. Hodiau en Pollando regas demokracio, apogita de laborista klaso, kamparana kaj intelektuala, hodiau laborantaj homoj estas mastroj de la shtato, neniu povas haltigi disvolvighon de laboristaj postuloj, kiuj de tiom da jaroj estis priĝantataj de laboristaj pceptoj; hodiau por ni estas deyzizo „Nur Volu“ — chion vi faros, chion vi rekonstruos, kion detruis la fashista mano, por tiu chi celo ni havas unue niajn bonajn gvidantojn, poste fabrikojn, minejojn; kamparanoj havas la teron, kaj se ni nur volos, nia forto multe faros. Neniu ekprovos nin interkvereli kaj malhelpos nian laboran planon efektivigi. Por tiuj, kiuj volus nin malhelpi, ni havas nian demokratian armeon, kiu neniam ekstaros kontrau laborantaj homoj, ghi defendos nin kontrau reakcia atako, ghi helpos kaj ghi estas avangardo por rekonstruo de pola socio, socio, kiu estos utila unu al la alia; de nun estas nek parazitoj nek mallaboruloj, kiuj vivis per laboro de malrichuloj; tia shato, kia estis antau la milito jam forpashis sen returno, por parazitoj en nuna Pollando oni ne havas lokon. Ni laboristaj esperantistoj volas havi bonan interkomprenon kun eksterlandaj demokratiaj laboristoj, ni devas multe korespondadi kaj ni alvoku esperantistaron por krei unu organizon en chiu lando kaj unu internacian en la mondo, por ke ne ekzistu IEL, UEA, SAT, IKUE, KELI, nur unu Tutmonda Esperanto-Asocio. kaj ke ni chiu laboristoj, kamparanoj kaj intelektualistoj trovighu en tia organizajho; lau nia opinio neniu esperantisto devus esti fashisto kaj kiu estas, tiu ne estas esperantisto, do por kia celo tiom da internacioj, por kia celo tiom da eldonataj gazetoj kaj chiu estas tiel mizeraj. Ni eldonu unu gazeton landan en chiu lando kaj unu internacian, por ke ghi estu sur bona papero, en bona stilo redaktata kaj pli vasta, regule aparigata kaj tion povas atingi nur unueco, Nur Volu — chion ni faros. Ni, Polaj esperantistoj tiel faris en Pollando ni havas unu organizon, unu jhurnalon esperantan, en nia organizo trovas sian angulon chiu, demokrato, socialisto, komunisto, kamparano, laboristo, pastro, studento, kiu nur volos kaj pensos demokrate; tial ni estos fortaj, certaj de nia venko en kreo de Dia mondo sur la tero.

**A. Piotrowski**

Główna Sekcja Robotników Esperantystów, — Warszawa,  
Al. Przyjaciół 9. C. K. Z. Z. — Bolesław Czechowski.

Shangho de adreso: Albin Piotrowski, Kraków, Rynek Gł. 34  
Pollando, peranto por SAT en Pollando.

## EL TENDARO DE SKOLTOJ.

### SKOLTARO EN LA POSTMILITA POLLANDO

Skolta vivo de la postmilita Pollando batas vigle en la ĝenerala takto kun la ĉiuj fortoj konstruantaj novan demokratian ŝtaton. Post longa, malbona nokto de la okupado, denove por polaj skoltoj eklumis libersuno.

Tamen dum la germana okupado skolta vivo ankau pulsas forte sub la tero (t. n. Grizaj Vicoj), batalante kun la hitlera teruro sur ĉiuj eblaj frontoj.

Dum la malfacilaj militjaroj niaj skoltoj laboris seninterrompe en la konspiro, disvolvigante sian organizon, en kiu hardis sin grandaj karakteroj de la nia junularo.

Pro tiu ĉi kauzo, ĉe la jarfino 1945 povis nia skoltaro atingi nombron da 250.000 anoj, disdivigitaj je la 16 Tachmentaroj, 427 Tachmentoj kaj 193 Truparoj.

Skolta ideo en la Polujo estas tre populara. Tuta nacio amas siajn skoltojn kaj ĉiu patrinō fieras, ke ŝia infano estas skolto. Ĉe Skoltestro (Z. H. P.) ekzistas Komisiono por Eksterlandaferoj (Varsovio, Wiejska 17), kiu peras kunligi korespondadon kun la eksterlandoj skoltoj. Komisiono havas multajn fakojn ekz. en Meksiko, Sud-Afriko, Palestino, Italujo, Rumanujo, Francujo, Danujo, Svedlando, Anglujo, Ameriko kaj Jugoslavujo.

Nun, kiam nia patrujo apogis fortege siajn limojn je la marbordo — ekstaris kaj plu fondighas multajn Marskoltgrupoj, kiuj havas jam por sia dispono kelkajn „jolojn“ (norvegajn boategojn) kaj 11 promenshipojn, ne kalkulante multegajn boatojn kaj boatetojn.

Granda Skolta Centro de la ŝvebsporto ekzistas en Biala-Bielsko. Tie ĉi oni instalas ŝvebmetiejon, en kiuj laboras plej bonaj inĝenieroj-konstruistoj, konataj en la tuta Europo.

Skolta skiklubo ĉi-jare farighis vic-majstro de la Polujo dum la skivetbatalo en Zakopane.

Pola skoltaro havas sian propran libroeldonejon kaj proprajn gazetojn, el kiuj la plej popularaj estas „Na Tropie“ kaj „Harcerstwo“. Nun ĉiu pola skolto revas pri la somertendaroj, malproksimaj ekskursoj.

Mgr. Stanisław Hreczuch

Ni petas chiujn redakciojn, ke ili sendu intershanghe siajn eldonajhojn, grupojn kaj asociojn, ke ili ekabonu nian gazeton, eldonejojn kaj aŭtorojn, ke ili sendu siajn librojn por recerzo!

\* \* \*

Atentu! Chiujn pagojn t. e. kotizon por A. E. P., abonpagon por „P. E.“, pagon por libroj direktu al P. K. O. konto: IV — 1096 Związek Esperantystów w Polsce (Asocio de Esperantistoj en Pollando), Kraków.

\* \* \*

Libroj riceveblaj che Admin. de „P. E.“:

W. Reymont. En fumejo de l'opio	zł 8.—
S. Przybyszewski. La Negho	zł 35.—
J. Żuławski. Pax	zł 15.—
Kabe. Internacia Krestomatio	zł 35.—
V. Avsejenko. Fraulino Suzano	zł 25.—
A. Grabowski. Postrikolto	zł 5.—
S. An-ski. Dibuk	zł 15.—
Fouque. Ondino	zł 35.—
A. Mickiewicz. Sinjoro Tadeo	zł 150.—
Unua kajero	zł 10.—
Pollando kaj Gdańsk	zł 25.—

Por afranko aldonu 10% de la sumo. Livero pro malgranda provizo sendeviga.

**ABONO:** jare zł 100.—, duonjare zł 55.—. Por la jaro 1946 t. e. de majo ghis fino de l'jaro zł 70.—. Aparta numero zł 12.—.

**ANONCOJ:** 1/2 pagho zł 1.000.—, 1/4 pagho zł 500.—, 1/8 pagho zł 250.—. Korespondado: 1 vorto zł 2.—.

**PRENUMERATA:** rocznie zł 100.—, półrocznie zł 55.—. Za rok 1946 t. j. od maja do końca roku zł 70.—. Numer pojedynczy zł 12.—.

**OGŁOSZENIA:** 1/2 strony zł 1.000.—, 1/4 strony zł 500.—, 1/8 strony zł 250.—. Korespondencja: 1 słowo zł 2.—.

Redaktas: Komitato.

Eldonanto: Asocio de Esperantistoj en Pollando.

Adreso de Redakcio kaj Administracio: Kraków, Rynek Gł. 34, ofic., III p.